# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



N-ro 22 - APR - MAJO - JUNIO - 1994

Kajeroj el la Sudo

Fondita en 1988.

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**

Prezidanto: Martín Bustín Benito
Nuevas Lomas, sec. 2, part. 13, bloq. 1,P-7, 2-A
03015-ALICANTE. (Hispanio)
*****
Sekretario: Jesus de las Heras Giménez
Av. Juan Carlos I, 24, 2/G, Edif. Nueva Ronda, 1
30008-MURCIA.
*****
Kasisto: Nicolas GIL Carballo
Apartado 305, 24080-LEON.
Envios de cotizaciones sin coste adicional a nombre del mismo, desde cualquier punto postal de España, a la Cartilla Postal nº 29-85.039.477.

---

Redaktoroj de la bulteno:

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.C.
50002-Zaragoza. (Hispanio)
***
Miguel Fernández Martín
C/ Santa Genoveva, 58. 6º C.
28017-Madrid. (Hispanio).

---

Kovrilo:"Les demoiselles d' Avignon"(1907), de Picasso, fundamenta verko en,la estetika renovigo je la komenco de tiu ĉi jarcento, kiam eniris en krizon la figurarto.

---

Enhavo:

Alvoko al nia anaro . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 3- pĝ.
Forpasis Federica Montseny . . . . . . . . . . . . . . . . . 4-5-6- "
Ankoraŭ pri lingvioj...kaj punkto! . . . . . . . . . . . . . 7-8-9- "
Hispanio strikis . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 10-11- "
Rezenco: Komercado de kulturoj kaj lingvoj . . . . . . . . . 12-13- "
Bonvolu ridi...sed ne tro! . . . . . . . . . . . . . . . . . 14-15- "
Sopiro al "interna ideo" . . . . . . . . . . . . . . . . . . 16-17- "
La Movado en kaj ekster Iberio . . . . . . . . . . . . . . . 18-19- "
Administra angulo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 20- "
Lirikaj paĝoj . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .21-22-23- "

---

NOTO: Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

# Alvoko al nia anaro

Al ĉiuj HALE-anoj!

La neokazigo de la ĉiujara asembleo de HALE, kunvokita pasintsomere en Valencio ĝuste en momentoj kiam estis demisiintaj preskaŭ ĉiuj estraranoj de nia LEA-o, kreis krizan situacion tre malfacile solveblan, kiu devigis la unuan prezidanton-fondinton de HALE, k-don José Mª Bernabeu, proponi provizoran komitaton, kies unua celo estis superi la krizon kaj eviti la malaperon de nia asocio. Estis speciale dankinda, ke la proponitaj k-doj akceptis la vakantajn postenojn, kaj tio ebligis la daŭrigon de nia asocio. La komitato konsistas el jenaj kdoj:

Prezidanto: Martín Bustin Benito, el Alikanto.
Vicprezidanto: Manuel López Hernández, el Seviljo.
Sekretario: Jesus de las Heras Giménez, el Murcio.
Kasisto: Nicolas Gil Carballo, el León.

Same akceptis daŭrigi plian jaron ambaŭ redaktoroj de nia organo "KAJEROJ EL LA SUDO", Antonio Marco Botella, el Zaragozo, kaj Miguel Fernández Martín, el Madrido.

Kompreneble, oni devas konsideri tiun gvidan komitaton kiel provizoran, ĉar ili ne estis rekte elektitaj de asembleo. Aldone ni diru, ke, ĉar la internaj problemoj de nia asocio ankoraŭ ne estis oportune debatitaj pro ne sufiĉa partopreno de membroj en la antaŭaj asembleoj, mi, kiel nuna prezidanto, kunvokas ĉiujn HALE-anojn al ordinara asembleo, okazonta en Malago, de la 16a ĝis la 21a de Julio 1994, laŭ jena tagordo:

1. Legado kaj eventuala aprobo de la antaŭa protokolo.
2. Legado kaj eventuala aprobo de la jara bilanco.
3. Informo pri nia organo "KAJEROJ EL LA SUDO".
4. Elekto de novaj Komitato kaj redaktoroj por nia organo.
5. Konfirmo aŭ disigo de niaj kunlabor-rilatoj kun HEF.
6. Situacio kaj uzo de la havaĵo de nia asocio.
7. Novaj kotizoj.Minimuma agadplano por la periodo 1994/95.
8. Petoj, proponoj kaj demandoj.

Eventualaj sugestoj kaj petoj por kompletigi ĉi tiun tagordon ĉiam estos bonvenaj.

En la nomo de HALE-Komitato
Martín Bustin Benito

# Federica Montseny

*En Tuluzo (Francio), en la aĝo de 88 jaroj, forpasis la 14an de januaro Federica Montseny, unu el la plej elstaraj figuroj de la liberecana movado en Hispanio.*

*Ŝi naskiĝis en Madrido la 12an de februaro 1905, kaj ŝiaj gepatroj estis la prestiĝaj anarkistoj Juan Montseny kaj Teresa Mañé, ambaŭ pli konataj per la nomoj Federico Urales kaj Soledad Gustavo, respektive, fondintoj de "La Blanka Revuo"(1898-1906) kaj "Tero kaj Libero" (1902-1938). La homoj de mia generacio, kiuj travivis la teruran hispanan intercivitanan militon (1936-1939), tute ne povas forgesi la serion da edukcelaj noveletoj eldonitaj de tiu ideologa paro, i.a. "La ideala novelo" (1925-1937), plena de idealismoj kaj romantikaj puraj sociaj ideoj, kiuj ĉarmis la tiamajn gejunulojn. Federica verkis plurajn el tiuj noveletoj.*



*Federica Montseny neniam vizitis la oficialan lernejon, ĉar edukis ŝin ŝia patrino, titolita instruistino, sed vizitis la Universitaton de Barcelono, kie ŝi studis Filozofion kaj Beletron. Tre juna, ŝi jam sentis la bezonon batali por la liberecanaj ideoj kaj, apenaŭ 12-jara, ŝi deziris partopreni en la grandaj strikoj okazintaj en Barcelono en 1917. Ŝi tuj aliĝis al la sindikato CNT kaj kunlaboris en liberecanaj ĵurnaloj kaj revuoj. Ekde la jaro 1931 ŝi firme apogis la Iberian Anarkisman Federacion kiel specifan organizon sendependan de la sindikato, strebis kun la laborista movado por starigi la 2an Respublikon, sed baldaŭ ŝi konfesis sian elreviĝon, kiam la respublikaj regantoj ne montriĝis solidaraj kun la popolaj aspiroj.*

*En 1936, post la eksplodo de la hispana intercivitana milito, en terure malbonaj cirkonstancoj, la socialisto Largo Caballero invitis ŝin partopreni kiel ministro en la hispana registaro. Ŝi devis akcepti malgraŭ siaj kontraŭŝtataj opinioj, kiel reprezentanto de la sindikato CNT, ĉar nepris la unueco de ĉiuj antifaŝismaj politikaj kaj sociaj formacioj. Estis tiu unu el la decidoj plej tiklaj kaj malfacilaj de ŝia tuta vivo, sed la dilemo pivotis inter diktaturo kaj demokratio, kaj ŝi devis cedi. Ŝi estis ministro pri Sano kaj Sociala Asistado de novembro 1936 ĝis majo 1937 kaj de tiu posteno ŝi okupiĝis pri la urĝaj problemoj de la milithospitaloj kaj evakuo de rifuĝintoj. Dum sia mallonga mandato ŝi leĝigis la abortig-rajton kaj starigis la t.n."liberigejojn de prostituitinoj".Temis pri institucia j domoj, en kiuj la prostituitinoj loĝis kaj lernis profesion.*

*Post la hispana milito ŝi ekziliĝis en la sudon de Francio, sed, forkurante de la germanaj nazioj, ŝi serĉis rifuĝon en Burgonjo, kie ŝi estis fine arestita. La hispana diktatoro petis ŝian ekstradiciiĝon, sed la francaj aŭtoritatoj ne akceptis ĝin, ĉar en tiu momento ŝi estis graveda.*

*En 1945, post la mondmilita fino, ŝi denove translokiĝis al Tuluzo, kie ŝi ĝismorte loĝis.*

*En 1977 Federica Montseny revenis denove al Hispanio por restarigi la sindikaton CNT, kaj de tiam ŝi ofte venis al Barcelono, kie loĝas ŝiaj genepoj. Ŝi okupis ĉiam altajn gvidajn postenojn en la nacia komitato de la liberecana hispana movado.*

*Federica Montseny verkis:"La virino, problemo de la viro" (1932), "Anselmo Lorenzo" (1938), "Miaj spertoj kiel ministro pri Sano kaj Sociala Asistado" (1938) kaj "Cent tagoj el la vivo de virino" (1949). En 1987 ŝi publikigis aŭtobiografian verkon "Miaj unuaj kvardek jaroj", en kiu ŝi rakontas sian vivon, de sia naskiĝo ĝis la fino de la 2a mondmilito. Ŝi verkis ankaŭ multnombrajn artikolojn en liberecanaj gazetoj, kaj estis vera ĝuo legi ŝiajn rakontojn en ŝiaj idealistaj noveletoj, kie ŝi emfazis la socian justecon, la liberan amoron kaj la abomenon al ĉia subpremado.*

*Kurioze, tiu ĉi virino, kiun la gazetaro elstarigas nun,*



*okaze de ŝia forpaso, nur ĉar ŝi estis la unua hispana virino, kiu okupis ministrejon, ofte konfesis, ke tio, kion ŝi plej bedaŭras en sia vivo, estas ĝuste tio, "estinti ministro", kvankam siatempe ŝi ofte proklamis, ke ne pro tio ŝi rezignis pri siaj ideoj.*

*Federica Montseny Mañé, defendanto de libera amoro, senlaca batalanto por libero kaj justa socio: vi pace ripozu!*

*LA REDAKCIO.*

*** ****** ***

# Ankoraŭ pri lingvioj kaj... punkto!

La lasta artikolo pri "Lingvioj" aperinta en "S-ulo"-Febr.-94, subskribita de Petro Levi, montriĝas pli klarvida kaj trafa ol la antaŭaj aperintaj de diversaj k-doj. Petro Levi prave venas al konkludo: "ke se ne ekzistas en la regularo de la SAT-Statuto iu punkto nepre postulanta kiel kondiĉon, ke ĉiu fondo de LEA-o estu kreita surbaze de lingvio; se ne ekzistas en la Gotenburga Konvencio iu ajn precizigo tiurilate", kaj plie, se la SAT-P.K. ne plu konsilas tiun prilingvian kondiĉon, evidente ne plu ekzistas tiu problemo, kaj la debato, ĉar senfundamenta, postulas finiĝon...

Kio do okazis por tio, ke dum pluraj jaroj la problemo pri lingvioj venenis la rilatojn de HALE kaj SAT-P.K.? La afero venas de antaŭ longe kaj komenciĝis okaze de la fondo de HALE (1986) en momentoj tute ne agrablaj. Aparte de ofendo komparа, ĉar la SAT-P.K. entuziasme helpis la katalunajn naciistojn, kiam ĉi tiuj pro strategiaj politikaj motivoj volis fondi propran katalunan LEA-on tuj fiaskintan, dum HALE ricevis nur la indiferenton de niaj Parizaj k-doj, ĝis tia grado, ke la anonco de ĝia oficiala fondiĝo (17-7-87) restis preskaŭ nekonata en niaj medioj. Nur kiam ni private protestis, oni disvastigis la novajon.

La problemo pri la lingvio komenciĝis, kiam la tiama HALE-prezidanto ricevis leteron de la SAT-P.K. indikantan jenon:

"Laŭ la tradicio, LEA ne estas landa laborista E-Asocio, sed ĝi kovras teritoriojn de sia lingvo (SAT-Amikaro estas LEA por franclingvio). Do, HALE devus esti ne hispana LEA, sed hispanlingvia LEA".

Tiu paragrafo montras, almenaŭ, absolutan miopion de la Pariza gvidanto, ĉar en Hispanio ekzistas kvar oficialaj lingvoj, ĉiuj ili parolataj, kaj la komento de tiu responsulo kiel reprezentanto de SAT metis nin en gravan konfuzon...Ĉu HALE havis ĉiujn necesajn elementojn por esti akceptita en la SAT-komunumo? En kiun lingvion enkadrigi asocion, kies membroj apartenis al diversaj lingvioj? En nian penson tuj venis la konvinko, ke tiu lingvia postulo estas neaplikebla.

De tiu momento komenciĝis la debato pri "lingvioj" ne laŭstatuta vidpunkto, sed laŭ nia opinio, kiel arbitra postulo nelogika, do ni penis en ĉiuj konvenaj cirkonstancoj elmontri, ke tiu "tradicio" (tiel nomata de la P.K.) en la fondo de LEA-oj estis, minimume, kaduka koncepto pragmate nepostulebla. Laŭ tiu linio mi verkis artikolon pri tiu konkreta temo (1988), sed la redaktoro de "Sennaciulo" ne publikigis ĝin. Mi protestis rekte antaŭ la prezidanto mem de la P.K., kaj finfine la artikolo aperis kun ekskuzoj, post sepmonata atendo (S-ulo 1005). Ankaŭ la prezidanto, siaflanke, respondis min (21-9-89) kaj promesis al mi la asocian helpon, ja nia ekonomia situacio estis tre malriĉa por ekfunkcii. La vero estas, ke HALE neniam ricevis de Parizo eĉ simplan krajonon, kaj kiam ni devis aĉeti elektronikan maŝinon por kompostado de "KAJEROJ EL LA SUDO", tute modesta pensiulo devis pagi ĝin per prokrastitaj pagoj laŭlonge de pluraj monatoj. La menciita artikolo emfazis "la rajton de HALE ekzisti, ne surbaze de limoj regionaj, ŝtataj aŭ lingviaj, sed profitante la pozitivajn rilatojn de kolektivoj komune kunvivantaj dum jarcentoj en iberiaj teritorioj".

De tiu jaro en ĉiu SAT-kongreso oni parolis pri la temo "lingvioj", sed nur polemike, eble eĉ sen la konkreta intenco solvi la problemon. En 1990, en la SAT-kongreso okazinta en Linz, oni debatis pri la rolo de LEA-oj kaj oni aludis al la Konvencio de Gotenburgo inter SAT-LEA-oj kaj iliaj respektivaj taskoj, sed neniu klarigis kial LEA-oj devas esti fonditaj

surbaze de "lingvioj".

En 1991, en la kongresdebato pri rilatoj inter LEA-oj, oni prezentis plurajn demandojn pri "lingvioj", sed neniu SAT-gvidanto sciis respondi. En 1992, en la kongreso de Kaunas, la afero ne nur ne progresis, sed atentinde regresis, ĉar en la kongresdebato la SAT-reprezentanto insiste marteladis: "ke LEA-oj ne baziĝas sur ŝtatoj sed sur lingvioj aŭ lingvaj teritorioj" (S-ulo, Okt. 1992). Kompreneble la aserto ne sin subtenis, ĉar pragmate preskaŭ neniu LEA-o funkciis en tiu momento sur bazo lingvia, kaj kiel reagon mi aperigis artikolon en "Kajeroj el la Sudo", n-ro 17/1993, kaj saman artikolon ankaŭ en S-ulo-Apr. 1993. En ĝi mi eksplikas la staton de ĉiu LEA-o sub lingvia vidpunkto, laŭ mia opinio "ĥaosan", kio vere tute ne signifas, ke la aluditaj asocioj ne funkciis/as kontentige.

Tiu artikolo, taŭga por inciti al la debato kaj utila por serĉado de eventuala solvo, kaŭzis ankaŭ miskomprenojn. Ekz., k-do Hardy interpretis (S-ulo, Jun. 1993), ke mi diras: "Laŭ la Gotenburga Konvencio LEA-oj devus organiziĝi ne laŭ ŝtatoj, sed laŭ linvioj", kaj tuj li donas precizigojn. Kompreneble, tio ne estas ĝuste tiel, ja en tiu kazo mi tute simple ripetis la paragrafon, kiun svingis la P.K. okaze de fondotaj LEA-oj de kiam HALE naskiĝis. Ja ĉiuj niaj legantoj komprenas, ke mi ĝuste batalis kontraŭ la signifo de tiu paragrafo. Sed, en tiu momento mi ne respondis al tiu repliko, ĉar mi ne volis polemiki, same kiel mi ne tion faris okaze de repliko de k-do Lagrange (S-ulo-997, 1988), precipe ĉar mi konjektis, ke miaj respondoj ne kontribuos al la solvo de la problemo. Tamen en la repliko de k-do Hardy mi trovis paragrafon tre trafan, kiam je la artikolofino li skribas:"La plej saĝa sinteno estas fidi la laboristajn esperantistojn por ke ili sin organizu laŭ formo plej konvena de la lokaj cirkonstancoj".

Tiu trafa opinio de Hardy konfirmis nian konvinkon, ke ni iris sur la bona vojo, kaj iamaniere ĝi komplementis nian diron en "KAJEROJ" en la ĵus citita artikolo:"ke estas la strukturoj de la organizaĵoj, kiuj devas adaptiĝi al la bezonoj kaj celoj de la individuoj aŭ kolektivoj".

Kiel mi jam substrekis je la komenco de tiu ĉi dokumento, k-do Petro Levi en sia lasta artikolo venas al la konkludo,

ke ĉar la Gotenburga Konvencio enhavas neniun precizigon pri la kreo kaj strukturo de LEA-oj, kaj la P.K. mem ne plu postulas devigan lingvian kondiĉon, ni, hispanaj HALE-anoj, kiuj neniam akceptis la tezon pri lingvioj, tute simple ĉar ni estas plurlingvanoj, plene konsentas pri la propono de k-do Levi: "neniu regulo povas esti pli fleksebla ol la foresto de regulo", do ni akceptas ne adopti ian ajn regulon por la fondo de LEA-o. Kaj sendube tiel finiĝas debato kaj difinopledo ĉiam malagrabla por HALE.


Eble, restas en la aero pluraj demandoj senrespondaj ĝis nun, antaŭ ol definitive fermi la debaton: kiu uzis unuafoje la vorton "lingvio" en SAT en pasintaj tempoj? Kiel naskiĝis la koncepto "lingvio" en niaj medioj kaj kiu decidis ĝin apliki por la fondo de niaj laboristaj asocioj? Kiu decidis nun, en modernaj tempoj, postuli la lingvion kiel modelon por enkadrigi laboristan asocion? Mi volas neniun akuzi, neniun aludi malbonintence, la respondo al tiuj demandoj eble nestas en malnovaj dokumentoj de antaŭ pluraj jardekoj, kaj eble kelkaj kamaradoj eĉ konsideros miajn demandojn iom frivolaj. Mi ne opinias tion. Ĉu estas tro, se mi tute respekteme petas al fakuloj, precipe al reprezentantoj de LEA-oj en Parizo,kaj ankaŭ al la prezidanto de LEA-SAT-Komitato, doni respondon al tiuj demandoj?

Principe, la koncepto lingvio sendube havas novkoloniismajn resonojn... Sed tio estas ja alia afero.

Antonio Marco Botella

P.S.
"KAJEROJ EL LA SUDO" permesas eventualan reprodukton de tiu ĉi artikolo en "Sennaciulo" aŭ periodaĵoj de niaj LEA-oj, kompreneble se la koncernaj ĉefredaktoroj konsideras tion interesa por ties legantoj. Ni, niaflanke, jam decidis meti finan punkton al la temo.

TIRANO BANDERAS
en Esperanto
mendu ĝin tuj



# HISPANIO STRIKIS

Kiel ni prognozis en nia antaŭa numero, la pasintan 27-an de januaro okazis kaj sukcesis la kvara ĝenerala striko kontraŭ la ekonomia politiko de Felipe González, malgraŭ la mastraro — CEOE — kaj ties lakeoj — la hispana socialisma registaro —, kiuj cinike ĉikanis por negi la du faktojn. Sukceso rilate al la deruliĝo sed ne rilate al la efiko.

Jam antaŭ la striktago ambaŭ formacioj amaskomunikile artileriis mesaĝojn pli proprajn al la Franco-a epoko ol al la nuna, oficiale demokratia: i.a. deadmonajn riproĉojn pri la maloportuneco de la striko kaj minusvalorigon de ties antaŭvidebla sukceso, kiun ili atribuus al la agado de la t.n. *informaj strikpostenoj*, aliflanke, tute laŭleĝaj nialande. Pri la aliaj strikpostenoj, institucie neagnoskitaj, kaŝaj kaj perversaj — la entreprenistoj minacantaj per maldungo — ili, kompreneble, ne aludis. Endis iel ajn senpravigi la kunvokon far la sindikatoj. Endis iel ajn senprajmigi la etoson de socia indigno, kiun estigis leĝaro seniganta la laboristojn je rajtoj konkeritaj per centjara eposa batalado kontraŭ la gangsteroj de la mastraro, kontraŭ la faŝismoj kaj kontraŭ la arbitreco kaj manko de sociala sentivo ĉe la ĉio-povaj.

*Absolute normala*, oni senĉese epitetis per televizio kaj radio — malice subliminale, slogane, stulte — la disvolviĝon de la 27-a de januaro. Tia normalo! Sufiĉis promeni surstrate por konstati la dimanĉeskan aspekton de la urboj: butikoj fermitaj, magra nombro da veturiloj, marasmo... Normalis nur la sinteno de la popolo, kiu, per sia neĉeesto al la laborpostenoj, deziris ne sturmi ajnan vintro-palacon, sed manifesti sian energian proteston kontraŭ registaraj dispozicioj grave lezantaj ĝiajn interesojn.

Hispanio strikis. Jen kiel du el la plej gravaj ĵurnaloj de Madrido, "El Mundo" kaj "El País", anti- kaj por-registara, respektive, diference enfokusigis la saman eventon: "La plimulto strikis", "La striko ne estis ĝenerala". Klaris do la defio de González kaj ties kabineto. Malakceptante la evidenton, ili ne nur plenumis sian arogantan promeson pri nesubmetiĝemo al la strikrezulto, sed ankaŭ ridindigis la laboristan movadon, senaŭtoritatigis ĝin ekstermo-cele. Pura kaj dura thatcherismo.

Pri la indico de partopreno estiĝis vera milito de ciferoj: 90% laŭ la sindikatoj, 26% laŭ la mastraro, 30% laŭ la registaro. Sed kion oni postulas de ni, hispanaj laboristoj? Eĉ se verus la plej senĝenaĉe pesimisma el la tri pritaksoj, ĉu tio disdegnindus? Ĉu en nia lasta ĝenerala elektado balotis por la nuna ĉefministro multe pli da civitanoj? Kia senpotenco! Kia frustracio!

La 3-an de februaro la responsuloj de la du majoritataj sindikatoj —

CCOO kaj UGT — rendevuis kun Felipe González. Vane. González reasertis la samon, kiun li pli frue leteris al ili: oni neniel reapertos intertraktadon pri la labora reformo, do la sindikatoj laŭbontrove kunsidu kun CEOE por alveni al interakordo. Tia kunsido, kompreneble, ne okazis pro rifuzo far la mastraro. Ĉu povus esti alie? Ĉu la entreprenistoj rezignus pri eĉ unu el la eksterordinaraj instrumentoj, kiujn la socialistoj enmanigas al ili?: senbridaj kaj malpleje kostaj maldungoj, mizeraj laborkontraktoj, laŭvola translokado de laboristoj...

Hispanio strikis, sed nun, en marto, kiam ni redaktas ĉi liniojn, restas pri tio plena muto, ŝajna forgeso kaj nula efiko. Kia honto! Eĉ pli terure, la pliaĉiĝo de la socialaj kondiĉoj ne estigas la adekvatan respondon niaflankan. La apliko de la labora reformo dum la unua monato sekvigis kreskon de la senlaborularo je 63.615 homoj, tiel ke la nuna nombro da hispanoj en stato de sendungado atingis la ciferon 2.769.457 ( nome unu el ĉiu kvina laboristo ), laŭ oficialaj statistikoj. La registaro ĵus heroldis sian projekton plialtigi la aĝon de emeritiĝo, aŭguris absolutan bankroton pri la sistemo de sociala asekuro...

Kie ni? Kie nia reago? Kiu kulpas pri ĉi peĉa situacio? Nu, ja ĉefe kulpas CEOE kaj la registaro, sed agnoskendas, ke la sindikatoj ne scipovis stari sur la nivelo de la gravegaj cirkonstancoj travivitaj. La sindikataj strukturoj rivelis sin feblaj, kadukaj, anakronismaj, nekapablaj inde alfronti la grandan batalon iniciatitan de la novtipa kapitalismo.


Jen do la plej urĝa tasko nin koncerna: nuntempigi niajn laborajn organizojn kaj lukto-metodojn. Magiaj formuloj por tion atingi ja ne ekzistas. Nur per serioza memkritiko, per konstantaj analizoj kaj debatoj, per drastaj mobilizoj kontraŭ arbitreco kaj maljusto ni povos rekrei nin kiel laboristojn ĉi-epokajn, doti nin per plej taŭgaj bataliloj. Ĉu ŝvitige? Sendube jes, sed ni perludas nian dignon, nian prezencon kaj nian futuron.

LA REDAKCIO

******



Ni atentigas niajn gekamaradojn kiuj ankoraŭ ne pagis la ĉi-jaran kotizon aŭ abonon, fari tion kiel eble plej baldaŭ al la Kasisto de HALE, Nicolas GIL CARBALLO, Cartilla Postal n-ro 29-85.039.477, sen aldona sendokosto per hispana poŝta oficejo.



# Recenzo: Komercado de kulturoj kaj lingvoj



*Werner Bormann: Mondkomerco kaj Lingvo.*

*Aŭtor-eldono, Hamburg 1993. 21 x 15 cm. 47 p. broŝurita. Prezo: DM 3,50.*

*La rezencata verko enhavas la tekstojn de du prelegoj prezentitaj kadre de Internaciaj Kongresoj Universitataj en Roterdamo (1988) kaj Havano (1990). Ili servis ankaŭ kiel studmaterialo por kursoj de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en Sanmarino.*

*La unua prelego, "Komerco stimulas kompreniĝon", estas ne konvinka provo pravigi la sekvan pensoĉenon: komerco inter landoj kaj popoloj estigas kontaktojn, el kiuj rezultas komprenо, kiu poste evoluas al kompreniĝo; kompreniĝo estas bazo por paca kunvivado, kaj el ĝi fontas interkompreniĝo, tiu alta idealo, kiu estas anima rendimento. Al tiu celo de internaciaj rilatoj -kompreniĝo- la aŭtoro feble trudas Esperanton kiel idealisman faktoron, kiu "ebligas komprenon en tre reala senco, nome per lingvo, la rekta transportilo de ideoj kaj sentoj".*

*Skeptika leganto, rigardante kiel la homaro jam de longe komercadis kun bonaj rezultoj per plej primitivaj komunikiloj kiel gestoj kaj piĝinoj, apenaŭ samopinios kun Bormann pri la grava rolo de lingvo. Kaj, se lingvo iam estas bezonata, vendantoj ĉiam estas pretaj lerni la lingvon de potencialaj aĉetontoj. La kosto de tiu lingvolernado, kompreneble, estas kaŝe inkludita en la prezoj de la varoj kaj servoj. Post kiam la fakturitaj sumoj estos pagitaj kaj la varoj liveritaj, ne plu estos necese okupiĝi pri nebulaj konceptoj kiel kompreniĝo, kiun Bormann nomas "nocio el la spirita mondo". Jam pli efike parolis materialisme kaj internacilingve la mono.*

*Estas malfacile akcepti la konkludon, ke pli intensa interŝanĝado de varoj trans limojn de unuopaj ŝtatoj ebligas ekkonojn kaj, kiel sekvan ŝtupon, komprenadon. Neniel estas devigate al interkomercantoj reciproke respekti aŭ alpreni*

*fremdajn vivstilojn por efektivigi kompreniĝon. Male, tro intima apudesto de malsamaj kulturoj povas konduki, ne al kompreniĝo, sed al ksenofobio kaj rasismo, eĉ ene de la Esperantlingva komunumo. Jen la alia, malpura flanko de la monero, kiun Bormann ne tuŝis en la prezento de sia tezo.*

*En la dua prelego, "Ekonomia forteco kontraŭ kultura diverseco", la aŭtoro karakterizas du specojn de kulturoj. La unuaj estas "hejme katenitaj kaj ne kapablas disradii trans siajn proprajn landlimojn. Multaj troviĝas tra la tuta mondo, ankaŭ en Eŭropo. Kontraŭe, estas potencaj kulturoj, kiuj en la historio de la homaro ekspansiis kaj akiris apogantojn loĝantajn malproksime de la originaj centroj. Bormann serĉis la kialojn de tiu disdivido de kulturoj inter progresantaj, stabilaj kaj regresantaj. Li rifuzas faktorojn kiel multenombrecon kaj hegemonion, ĉar ne ĉiuj kulturoj, kies portantoj apartenas al teritorie granda ŝtato, aŭ al politike forta mondpotenco, posedas modelan karakteron kapablan influi aliajn kulturojn kaj tiri fremdulojn en ilian kondutaron. Laŭ Bormann, ne gravaj estas militista potenco nek religia misieco: restas, do, ekonomia forteco, sed sola ĝi ne sufiĉas. La esenca kaŭzo de sukcesa kultura influo sur aliaj homoj estas "la modela karaktero por la imitantoj, kiuj ŝatas vivi tiel, kiel tio estas kutima en tiuj kulturoj". Bormann trafe disvolvas tiun nocion por demonstri, kial la usona kulturo ĉie en la mondo estas akceptata, kaj pro tio enradikiĝas. Estas rekomendinde, ke pitaj, mallarĝmensaj esperantistoj, kiuj sur la paĝoj de Esperantaj periodaĵoj elsputas sian malamon kontraŭ la usona "pseŭdokulturo", atente legu la sobran eksplikon de Bormann.*

*Mi malsamopinias pri nur unu punkto rilatanta al la priskribo de ekspansiemaj kulturoj. La aŭtoro uzas kiel ekzemplojn de forte ekspansiantaj kulturoj la usonan, kiu tradicie havis tiun trajton, kaj la islaman en la nuna historia epoko. Tamen, estas esenca diferenco inter la du specoj de ekspansio. La usona kulturo ĉiam montris tendencon disradii horizontale en spaco, altirante en sian influsferon pli kaj pli da dise situantaj landoj kaj popoloj. Male, la islama kulturo, lastatempe rajdante sur la bolantaj ondoj de fundamentismo, ne ekspansiis eksteren sed regresis, profundiĝante ĝis siaj radikoj. Alivorte, ĝia evoludirekto estis vertikale sur la propraj*

*historiaj terenoj. Tion evidentigas la fakto, ke tre magra parto de la islama kulturo tuŝas la vivon de ne-islamanoj. Por paroli per komerca lingvaĵo, la usona vivstilo estas unu-klasa eksport-produktaĵo, dum la islama vivstilo konvenas nur por la enlandaj merkatoj.*

*Naiva esperantisto certe demandas nun: kiel ekspansias la verda kulturo? Ĉu ĝi estas vivstila komercaĵo havanta altir-valoron sur la monda merkato de ideoj? Tradiciaj movadanoj volas vendi ĝin en pakumo simila al tiu de la usona kulturo, esperante tiel akiri amasan apogon ĉie en la mondo. Raŭmistoj prefere elektas la islaman modelon de rafinado kaj profundiĝo. Ili, do, ignoras la strasaĵojn de la vendoplaco.*

*Ĉar la titolo de tiu ĉi prelego enhavas la esprimon "kultura diverseco", Bormann nur ĉe la fino, kvazaŭ piednote, mencias la eblan aplikon de Esperanto por konservado de kultura diverseco -"granda kaj malfacila laboro"- se ĝi iel kaj iam estas efektivigebla.*

*Bernard GOLDEN*

*****

# Bonvolu ridi... sed ne tro!

Surdulo

La kuracisto: -Bone, vi jam plene resaniĝis; tial vi ne bezonas reveni.
Paciento: -Kion?
La kuracisto: -Ke vi ne plu venu!
Paciento: -Kion?
La kuracisto: -Ke vi revenu morgaŭ!

******


Drinkemulo

Edzino ploras senkonsole kaj diras al sia edzo:
-Vi estas kruela! Vi venis hieraŭ nokte tute ebria, vi makulis la pargeton, kaj cetere, vi premmortigis mian karan kanarion! Ve! Ve!

La edzo (mirigita): Ĉu vere? Jen kial la citrono ne donis sukon!...

******

# Bonvolu ridi



## Sed ne tro!

### Psikologa vidpunkto

Sinjoro eniras en butikon por aĉeti paron da ŝtrumpoj. La vendisto, sperta psikologo, sciante pri lia deziro, demandas tre afable al la kliento:

Ĉu ili estas por via edzino, aŭ ili devas esti pli multekostaj?

******

### Demokrata decido

Vizitante frenezulejon, inspektoro demandas al malsanulo, kial li troviĝas tie:

-Ĉar mi diris, ke ĉiuj miaj familianoj estas frenezaj, sed ili ankaŭ asertis la samon pri mi. Venkis, do, la plimulto...

******

### Diplomata respondo

-Ĉu vere plaĉis al vi la fino de mia romano?
-Ho, jes, tre multe!
-Kaj kion vi opinias pri la unua ĉapitro?
-Tiun ankoraŭ mi ne legis.

******

### En hospitalo

Kuracisto elirante el la ĥirurgejo renkontas la bofilon de la ĵus operaciita virino kaj alparolas lin jene:

-Mi devas diri al vi la veron, sed mi scias, ke vi estas forta kaj bone povas rezisti. Jen la novaĵo: Via bopatrino... saviĝos!

******

Kuracisto: -Ve! Via koro grave malsaniĝis pro misa ritmo! Tio estas grava afero por vi!

Paciento(konsternita): -Nu kion vi aŭdas en mia brusto?
Kuracisto: -Via korbatado similas al freneza rok-muziko!
Paciento (trankviliĝe ridetante): -Ha! Ha! Tio ne gravas, ĉar ankaŭ mi aŭdas ĝin! En la supra etaĝo oni dancadas laŭ tiu ritmo jam de antaŭ unu horo!

******

Kuracisto (emfazante): -Vi devas esti tre danka al mi, ĉar per la elspezo de unu sola vizito, mi trovis ĉe vi kvin malsanojn!

******

# Sopiro al "Interna Ideo"

La evoluo de la socio montras de tempo al tempo kontraŭdirojn neatenditajn, surprizojn nepenseblajn. Unu el la grandaj malfeliĉoj de nia epoko estas certa renaskiĝo de malgrandaj naciismoj kiel kontrapunkto al la ĝenerala aspiro de homoj kaj popoloj al libero kaj demokratio. Eble, la longa kaj kruela ruĝa subpremado de malgrandaj landaj minoritatoj en Orient-Eŭropo kaj aliaj diktaturoj en aliaj lokoj, estis la kaŭzo probabla de tiuj danĝeraj ŝprucoj, kiuj funkcias kiel motoroj de tiu regresema naciisma movado, minacanta nun meti Eŭropon en teruran konflagracion, elmontrinte kiom primitive kruela povas esti homo atakita de la naciisma viruso: lasta elmontro en eksa Jugoslavio... La influo de tiuj perversaj ideoj iamaniere aperis eĉ en la Esperanta Movado, kiel mi detektis en Valencio.

Pasintsomere mi partoprenis en la UK okazinta en Valencio, kie mi povis sperti la indikitan influon ĉe gentoj el la plej distaj partoj el la mondo. Ekzemple, kiam mi eliris el la koncerto de "SOLO", mi konversaciis pri muziko kun junulo, kaj post interŝanĝo de opinioj mi demandis lin el kiu lando li estas. Li fiere min respondis: "El Eŭskio!". Mi dubis, mia penso serĉis landon kun tiu nomo, sed mi ne ĝin trovis. Poste mi rimarkis, ho jes!: Vaskolando. Eŭskio estas nomo nek de lando, nek de ŝtato. Ĝi estas nomo inventita de vaskaj naciistoj, laŭ mia opinio ne tro trafe, kaj mi demandis min: Kial meti tiom da konfuzo inter la homojn? Mi konas tiun vorto-radikon, sed ĉu ni devas lerni ĉiun produkton naskiĝintan en la febra menso de utopiulo aŭ de politika minoritato? En tiu ĉi kazo, ĉu ne taŭgas Vaskolando, sufiĉe konata kaj digna nomo, tute esprimoplena en ĉiuj aspektoj?. Laŭ ili, ne! kaj eĉ en la parolon eniras la paranojo de la naciistoj.

Mia reago en tiu momento estis eniĝi en tiun kuriozan ludon, kaj... pensite kaj farite: mi inventis landon sen naci-aspiroj, "Eŭropio"-n, kaj skribis ĝin kvazaŭ temus pri mia propra lando sur mia kongreskarto. Baldaŭ mi konstatis, ke mia ideo ne estas novaĵo, ĉar ankaŭ granda nombro da germanoj montris en siaj respektivaj kongreskartoj tiun de"Eŭropa Komunumo".

Sed mia ludo ne tro daŭris, ĉar mi renkontis aŭstralianinon, kiu rigardante mian kongreskarton ne trovis mian landnomon



tro brila, kaj kun granda malkontento muntis antaŭ mi en unu minuto veran mitingon dure - kritikantan la malsolidaran Eŭropan politikon, laŭ ŝi kulpan pri la izoleco de tiom da homoj en ties hemisfero... Ĉu vi volas kredi min, se mi konfesas al vi, ke malgraŭ la tono acida de tiu spontana predikantino ŝi pravis en kelkaj punktoj kontraŭ mia ĵus elpensita "patrio"? Tiam mi pensis, ke se grandaj kaj malgrandaj nacioj tiel aĉe kondutas kontraŭ la homoj de unu aŭ alia kontinento, kian patrian titolon mi metus sur mian kongreskarton? Post rapida analizo mi konkludis, ke nur unu restas sufiĉe digna, tiu de "sennacio", kaj prefere montri neniun! Vere, homo devus montri en UK neniun nacititolon. Ĉu ĝi ne estas universala?

Post la rakontitaj incidentoj, mi multe cerbumis pri la sinteno kaj bildo donita de la esperantistoj en la UK okazinta en Valencio, ĉar en neniu momento estis trovebla la spirito supernacia kaj homama de nia "interna ideo", kaj la diligenta kolegaro ne estis tiu milfoje laŭdata "rondo familia" proklamita de nia majstro D-ro Zamenhof. En tiu aspekto la kongreso plene fiaskis. Cetere, la kongresorganizantoj, UEA, montriĝis, kiel kutime, tre bonaj negocistoj, sed tre malbonaj gardantoj de la esperantisma spirito. Ili, ne nur ne sciis kontraŭbatali la naciisman antaŭkongresan kampanjon de certaj elementoj, kiuj uzas Esperanton por siaj politikaj celoj, sed honte cedis en sia proklamita "neŭtraleco" kaj eĉ permesis krokodilan saluton tiusencan de la podio mem. Minimume, UEA devus peti publikan pardonon pro tiom da eraroj sur la kampo de la esperantisma etoso...Ĉu en tiu "universala" asocio ne ekzistas almenaŭ unu sola gvidanto, kiu zorgas pri la spirito de la movado, nun en evidenta regreso? Aŭ ĉu eble tiu gvida aparato nur taŭgas por "gajni monon", ne gravas kiel?

Kun bedaŭro mi skribas ĉi lastajn paragrafojn, sed komprenu, mi iris al UK por ĝui etoson koheran kun la "interna ideo" de Esperanto, mi iris al <u>universala</u> kongreso, kaj mi trovis homojn skeptikajn kaptitajn en la trompo de politikoj nanaj, kiuj forgesis la originon kaj celojn de nia movado:

interkomprenon de homoj kaj popoloj sen ia ajn diskriminacio. La vivo fariĝas pli kaj pli planeda, sed niaj gvidantoj planas nian futuron surbaze de lokaj interesoj.

Laŭ mia opinio, ni, esperantistoj, bezonas urĝan regeneron de nia idealismo, ĉar la merkantilisman lingvodisvastigan batalon jam antaŭ longe ni perdis... Nur en la idealo supernacia kuŝas ĉiuj esperoj de la esperantistoj.

Jesus de las Heras

******

# LA MOVADO EN KAJ EKSTER IBERIO

LA 67a SAT-KONGRESO okazos en Straznice, Ĉeĥa Respubliko, de la 16a ĝis la 23a de Julio 1994. Sufiĉe alloga programo: ekskursoj, debatoj, neforgeseblaj vizitoj. Ankaŭ estas programita tre interesa SAT-Antaŭkongreso okazonta en Prago, naskiĝurbo de SAT, de la 9a ĝis la 16a de Julio. Informoj: SAT; 67, Av. Gambetta, F-75020-PARIS. Francio.

--***--

15a Hispana-Franca Renkontiĝo en GRAUS. Organizite de la Esperanta Centro"FRATECO" de Zaragozo, la 4an kaj 5an de Junio okazos en GRAUS (Huesca) tiu interesa Renkontiĝo de geesperantistoj de ambaŭ flankoj de Pireneoj. Prelegoj, ekskurso, agrabla kunrestado garantiata al kiu estis invititaj la Grupoj de Barcelono, Sabadell, Pamplono, Logroño, Vitoria kaj Bilbao, krom niaj francaj gesamideanoj. Informoj: Esperanta Societo "FRATECO"; C/San Vicente de Paul,1,E. 50001-ZARAGOZA. Telf. (976) 22.74.97.

--***--

PREMIO ANDREU NIN

"Multfoje la historio ne estas justa. Eble ĉar ĉiam verkas ĝin la venkintoj, kaj tial tiuj homoj apartenantaj al la venkitoj restas laŭlonge de la jaroj tute forgesitaj, aŭ abomene rememorataj". Tiel pensas kaj diras la nuna urbestro de El Vendrell, Marti Carnicer i Vidal, kaj, por iamaniere korekti tian maljuston, li strebis, kun la urbestraro de El Vendrell, retrovi la fidelan memoron elvokante la figuron polemikan de la Vendrell-ano Andreu NIN, elstara revoluciulo kaj esperantisto de antaŭ pluraj jardekoj, kaj senpasie analizi la konduton kaj historiajn eventojn, kiuj ĉirkaŭas liajn viverojn en tiu tempo.

Tiucele, post duonjarcento de la drama forpaso de Andreu NIN, la urbestraro de El Vendrell kunvokas la t.n. "Premio Andreu Nin", kiun oni alju-

ĝos al esplora verko aŭ tezo pri sociaj kaj politikaj temoj, verkitaj en kiu ajn lingvo. Povas partopreni en la konkurso ĉiuj neeldonitaj verkoj, kaj la Regularo de la Konkurso aperos en kvar lingvoj: kataluna, angla, hispana kaj esperanta. La fina dato por prezentado de originaloj estos la 31a de decembro 1994, kaj la premio konsistos en la sumo de 1.000.000 da pesetoj.

Jurianos Pelai Pages (katedra profesoro pri Historio de la Barcelona Universitato); Pere Anguera (katedra profesoro pri Historio de la Universitato Riera i Virgili de Tarragono); Ramón Obiols (unua sekretario de Kataluna Socialista Partio); Victor Alba (verkisto) kaj Marti Carnicer (Urbestro de El Vendrell). Informoj: Urbestraro de El Vendrell; Area de Cultura-Cal Guimera. C/ Santa Ana, 8. 43700-EL VENDRELL.

Ĉar grandparte el niaj legantoj tute ne konas eĉ la nomon de Andreo NIN, "KAJEROJ" volis prezenti skize biografieton de tiu homo, pri kies figuro temos la kunvokita konkurso:

ANDREO NIN naskiĝis en El Vendrell en 1892 kaj profesie laboris kiel instruisto aŭ ĵurnalisto. Komence, li politike partoprenis en la katalunaj movadoj naciisma kaj socialisma. Ekde la jaro 1919 li aktivis en la sindikato CNT, kaj ene de ĝi li defendis la rusan revolucion, jen kial li kunlaboris kun la pro-komunismaj grupoj. Li vigle partoprenis en la 1-a Kongreso de la Internacia Ruĝa Sindikato (ISR) kaj en la 3-a Kongreso de la III-a Internacio, en kiu li reprezentis la sindikaton CNT. Post tiuj kongresoj li restis en Moskvo kiel reprezentanto de la Revoluciaj Sindikataj Komitatoj.

Okaze de arda polemiko tiuepoka pri la Socialismo en unu sola lando, oni akuzis lin kiel trockiston, kvankam en grava artikolo publikigita en "Correspondance Internationale" (Majo 1925) li solene deklaris sin kontraŭtrockisma. Li kontaktis plurfoje kun Trocki mem por debati pri ideologiaj temoj kaj en 1929 revenis en Hispanion.

En nia lando, post grava ideologia polemiko kun Maurin, Andreo NIN fondis kun J. Andrade la Grupon "Ezquerra Comunista", kies idearo fariĝis bazo por la fondo en 1935 kun alia Grupo, "Laborista Bloko", de nova Partio (POUM) "Laborista Partio pri Marksisma Unuiĝo", kiun gvidis Maurin, NIN, Bonet, Andrade, Arquer k.a., kaj kies ĉefaj programceloj estis: starigo de provizora proletara diktaturo, ebleco de la popoloj disponi pri la propra destino, sindikata unueco kaj unuiĝo de ĉiuj politikaj revoluciaj fortoj, precipe socialistoj kaj komunistoj, do la karaktero komunista de la nova partio montriĝis tute klara.

En 1936 Andreo NIN estis elektita deputito reprezentante sian partion en Teruel, balotita kiel kandidato en la listoj prezentitaj de la unueca maldekstra bloko Popola Fronto.

Je la komenco de la hispana intercivitana milito (1936-1939),ĉar la ĝenerala sekretario de la partio POUM, J. Maurin, estis kaptita de la militistaj ribeluloj, Andreo NIN okupis tiun postenon kaj ankaŭ aliajn elstarajn en la gvidado de la Ĝeneralitato de Katalunio (Kataluna Aŭtonoma Registaro): membro de la Ekonomia Konsilantaro kaj Konsilanto pri Justico.

En tiuj danĝeraj momentoj, gravega fendo fariĝis en la antifaŝismaj vicoj, kiuj subtenis la lukton, precipe en Barcelono: la socialistoj de PSUC kaj aliaj moderaj partioj favoraj al la Ĝeneralitato, kiuj volis starigi la ŝtatajn strukturojn, apogi la regaddaŭrigon de la popolfronta registaro kaj starigi apriore militvenkon per kreado de popolarmeo; kaj partio POUM kun la simpatio de certaj sektoroj de CNT-FAI, kiuj klopodis akapari ĉiujn risortojn de la povo, krei revolucian armeon kiel sola solvo por garantii la triumfon kontraŭ la ribelintaj militistoj kaj la konkeron de la socialisma revolucio.

Tiu diverĝeco de opinioj rompis la faktan unuecon de la respublikaj fortoj, kio kulminis en la teruraj eventoj de majo 1937 en Barcelono, kiam post dramaj bataloj surstrataj la partianoj de POUM kaj ties simpatiantoj estis venkitaj, ĝiaj gvidantoj procesitaj kaj la partio rigore malpermesita.

Koincidis tiu evento kun la politikŝanĝo de Stalin en Rusio, kiam la ruĝa diktatoro volis pereigi la bolŝevisman opozicion (procesoj de Moskvo), akuzitan de interkonsento kun Trocki, (inter kiujn la diktatoro metis Andreon NIN. Sovetiaj spionagentoj ricevis la ordonon mortigi la Vendrell-anon, kaj Andreo NIN estis murdita en Madrido dum monato Julio 1937.


Andreo NIN estas aŭtoro de pluraj verkoj:"Diktaturoj de nia tempo"(1930), "La hispana proletaro antaŭ la revolucio"(1931) kaj "La naciaj emancipiĝmovadoj" (1932).

Ŝajnas oportuna, ke Andreo NIN, polemika figuro politika dum longa periodo de nia historio, kiun kelkaj akuzis kiel perfidulon al la revolucio, kaj aliaj proklamis kiel heroon kaj martiron de vera socialismo, estu studata senpasie de novaj generacioj, kaj, se eble, ni, iamaj batalantoj, volus ricevi definitivan bildon, en unu aŭ alia senco, de unu el tiuj bravaj homoj, kiuj perdis la vivon batalante por siaj ideoj. Ĉiukaze io tute nepensebla en tiu ĉi nana nuntempo nur atenta al la zigzagoj de moŝta Mono.

LA REDAKCIO

# Administra angulo

--***--



Pagis la ĉi-jaran abonon:

| | | |
|---|---|---|
| Enrique Piquero......... | 1.000 | Ptoj |
| Sdad. Esperantista ESTO | 800- | " |
| Jaime Benito ........ | 1.000- | " |
| Jean Louis Carré ........ | 1.200- | " |
| SUMO | 4.000- | " |

# LIRIKAJ PAĜOJ

## LA LASTA VALSO

*(Al Vicente Aleixandre)*

Tiu komenco lanta:
kvintesenco
de la galanta gesto kor-kloniga
kaj de l' pudor' solvita duonsvenen
ĉe danc-invit' voluta...

Tiu kadenco svaga, ĝela, flusa
kiel orgasmo-aŭro — ho! — : aŭguro
de paroksismo sensa...

Tiu parfumo narda — ranc-odora —
je la ekzakta disto de suspiro

i i i
v n v n v n
Kaj... s g! unu du s g! unu du s g!...

La valso ekis:
abrupta flugilado,
puca girlando bugenvila,
agacaj grincoj el poluro planka,
amelaj krakoj, klakoj kalkanumaj.

Kaj sinko rozpetala.

Kaj dolĉaj baboj de serafo,
pozoj
ekscesaj, streĉaj, drole distorditaj:
la kavaliraj bustoj

virkoke brusto-ŝvelaj,
la damoj okulfermaj
— damoj lividaj ŝminke —,
kun la rokoka kapo retroklina
kaj l' muzeletoj pintaj...

i i i
v n v n v n
Kaj... s g! unu du s g! unu du s g!...



La valso pluas.
Estas la tempo de la vorto ĝusta
— siropa kompliment' aŭ ditirambo —,
kiu el preciozaj plukas pepojn
vunditajn de la ruĵ'.
Estas la tempo
de la leĝer' meringa,
de l' fajr' nekonfesata,
de la prodaĵ' poltrona,
hop!:
beketi kison
— perfido de la punĉo! —,
beketi kison laŭ la takto valsa.

i i i
v n v n v n
Kaj... s g! unu du s g! unu du s g!...

La valso pluas.
La valso tuj akmeos.
La valso iĝis jam skualo fola,
trombo da pompo, filigran' kaj kaŝ-lascivo,
trompo el mosko rava, kiu preskaŭ min kuntrenas.

Kreskas la trombo, sed la vals' eksteras,

preteras la ŝaŭm-ondojn
ĉe la ingvenoj moŝtaj,
la perlajn roso-gutojn ĉe l' pudendoj,
la sagan ĉiel-iron
de la pendaĵoj gloraj,
la krevon de l' granatoj interkruraj,
la deziron
pudritan de la prudo.

Kreskas la trombo plue kaj ensuĉas
ĉion postiĉan — kiĉan —. Ho, kortezo!
Ho, pufo kaj parado!
Ho, karapacoj, maskoj kaj perukoj!

Valsas skeletoj de pingven' rikane
kun mutaj skeletinoj de gorgono.
Sur tombo-ŝtonoj, dume, la aliaj
febran volupton soliteras.
Verdo
en pompejeska rubo, flagro de kurtenoj,
formikpululo ĉe l' senbuŝaj buŝoj
aŭ neforgesumino interdente...
Sed, revenu!
La valso de la falso daŭras plue,
valso ripeta tede,
ripet' koŝmare prema,
koŝmar' sen kapo kaj sen fin'.
Revenu,
leviĝu el la seĝo de spektantoj,
ekpaŝu, valsu: giru kaj turniĝu,
turniĝu plu kaj... — sving! — kaj... — sving! — kaj sving
u vin el svarmo balo-sinen, snufu
plenpulme,
ĝislime streĉu l' fibrojn de l' furio
kaj longe bombe tondru: "jam sufiĉas!!!"

MIGUEL FERNÁNDEZ

**NOTO DE LA REDAKCIO: Ĉi verko ricevis la premion *Eglanterio* por la plej kvalita poemo pri temo laŭvole elektita en la *32-aj Internaciaj Floraj Ludoj*.**

*Kajeroj*
*— el la Sudo*

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Str, Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9ª.
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Depósito legal: Z - 2398 - 88
Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas, S.A.